

# L



**Valdemar Langlet  
(1872–1960)**

**Langlet, Valdemar Georg** [lanlé]. Svedo. Nask. 17 dec 1872 en vil. Lerbo proksime al Katrineholm (prov. Södermanland, Svedio) kiel la plej juna (kvara) filo en la familio de la arkitekto Emil Victor Langlet (1824-98) k ties edzino, verkistino k tradukistino Mathilda Langlet (den: Söderén, 1832-1904), kiuj geedziĝis en 1864. Lernis en Stokholmo (1882-86) k Upsalo (1886-90). En 1890 studentiĝis en la Upsala Universitato, en 1894 diplomiĝis pri filozofio. Dum 1894-97 multe vojaĝis (Ruslando, Azio, Orienta Eŭropo...), okupiĝis pri Eo k kunlaboris kun la gazeto *Fyris* (Upsalo). Post sepjara laboro en *Stockholms Dagblad* (1898-1905), danke al stipendio de Sveda Publicista Klubo studis en universitatoj de Germanio, Svislando k Aŭstrio-Hungario (1905-06), poste laboris dum 1907-1909 kiel sekretario de la Sveda Turista Asocio, samtempe kiel sekretario de la sekreta gazetara servo de la ministrejo de eksteraj aferoj. Ekde 1909 dum 20 jaroj laboris en la redakcioj de *Svenska Dagbladet*, *Aftonbladet* k aliaj gazetoj. En 1930-31 loĝis en Dubrovnik (Jugoslavio).

En 1932 ekloĝis en Budapeŝto, laboris en la sveda ambasado k instruis la svedan lingvon en la Budapeŝta Universitato. En 1944-45 gvidis la oficejon de la Sveda Ruĝa Kruco en Budapeŝto; kun sia edzino okupiĝis pri protektado de judoj kontraŭ la nazia persekutado; miloj da persekutatoj ricevis protektleterojn k estis savitaj. Post la Dua Mondmilito V. Langlet revenis al Svedio, okupiĝis pri tradukado k verkado. Aperigis plurajn svedlingvajn librojn, inkluzive de *Surĉevale tra Ruslando* (1898), *La revoluciaj movadoj en Ruslando* (1905), *Sveda ekstera politiko* (1912), *Surĉevale tra Hungario* (1934), *Faroj kaj tagoj en Budapeŝto* (1946) k. a. Tradukis multajn librojn el kelkaj lingvoj, precipe pri historio, politiko k filozofio.

Ricevis la Krucon de la Ordeno de la Hungara Respubliko (1945), la arĝentan medalon de la Sveda Ruĝa Kruco (1948) k la Reĝan ordenon “Polusa Stelo” (Nordstjärneorden, 1949). Pli frue ricevis la ordenon “Kruco de libero” (Frihetskorsset, 1918) pro la partopreno en la interna milito en Finnlando je la kontraŭrevolucia flanko.

En 1899 edziĝis kun Signe Blomberg (1876-1921), e-istino el Alandaj Insuloj (princlando Finnlando en Ruslanda Imperio). Laŭ EdE, tio estis la unua internacia E-geedziĝo. Ili havis du filojn. Ankaŭ lia dua edzino (1925), Nina Borovko-Ĉajkovskaja (1896-1988) estis E-aktivulino – filino de la ruslandaj E-pioniroj Nikolaj Borovko (1863-1913) k Antonina

Ĉajkovskaja (1872-1948, ŝi helpis al V. Langlet k E. Etzel dum ilia vojaĝo tra suda Ruslando en 1895). Mortis 16 okt 1960 en Stokholmo.

En 1965 Israelo donis al la geedzoj Langlet la honoran titolon “La justuloj de la mondo”. En 1982 aperis la libro de Nina Langlet *Kaoso en Budapeŝto* pri ilia savagado en Hungario (Ea traduko, 2001). Omaĝe al li estas nomitaj stratoj k lernejoj en Stokholmo k Budapeŝto, kajo en Budapeŝto, parko en Upsalo k Katrineholm.

Esp: 1890 (Adr. №1256). En oktobro 1891 kunfondis la E-klubon en Upsalo (la dua oficiala E-klubo en la mondo) k estis ĝia prezidanto (1892-99). En somero 1895 kun sia amiko Eric Etzel entreprenis vojaĝon tra Finnlando, Ruslando, Rumanio, Aŭstrio-Hungario k Germanio – laŭ EdE ĝi estis la plej unua internacia vojaĝo per Eo. Kadre de ĉi tiu vojaĝo V. Langlet renkontiĝis en Odeso kun ruslanda e-isto V. Gernet, k ili decidis pri lanĉo de la ĉiumonata gazeto *Lingvo Internacia*, redaktata de V. Gernet k eldonata de la E-klubo de Upsalo sub la gvido de V. Langlet. Fine de 1897 V. Langlet transdonis la eldonadon de *Lingvo Internacia* al P. Nylén. Verkis plurajn artikolojn por *Lingvo Internacia* ekde ties provnumero (dec 1895), kunlaboris kun *L'Espérantiste* de L. de Beaufront. (Liaj fruaj verkoj, inkluzive de la rakonto pri renkontiĝo kun Lev Tolstoj, kolektitaj de F. Luin, aperis elektronike en 2002.) Aperigis broŝuron pri Eo k kanton, muzikigitan de C. Adelsköld. Unu el liaj poemoj estas en FK. En 1906 kunfondis Svedan E-istan Societon k prezidis ĝin ĝis la skismo en 1909, kiun kaŭzis svedaj adeptoj de Ido. Post la Unua Mondmilito malaktiviĝis, sed restis membro de SEF; dum sia restado en Hungario partoprenis E-kunvenojn en Budapeŝto.

▼ *Esperanto ett korrespondens- och*

*turistspråk* (1896); *Kanto al la fago de paco* (Kun muziknotoj, 1897); *Vojaĝimpresoj* (2002).

**B** CEOLE, p. 43-44; EdE, p. 325, 344, 522, 523 k. a.; HEL, p. 44-45, 563; KEL, Vol. 2, p. 231-232; OVP, p. 135-136. Emanuelsson A. *Valdemar Langlet – en glömd hjälte?* Katrineholm, 1999; Langlet N. *Kaoso en Budapeŝto*. Tr. el la sveda K. Knivilä. Varna, 2001; *Publicistklubbens porträttmatrikel*. Stockholm, 1936, p. 322-323. Kökény L. *Homo en la senhomeco* (HV, 1963, №3); Golden B. *Valdemar Langlet, 1872-1960. Engaĝiĝinta idealisto* (Kontakto, 1981, №3); Thomander H. *Valdemar Langlet – heroo en la ombro de Wallenberg* (La Espero, 1991, №1); Knivilä K. *Esperantisto kontraŭ malhomeco* (Eo, 1995, №5); Zajdman Je. *Tri brilaj paroj* (Kontakto, 2005, №2). *Svenskt biografiskt lexikon* <http://sok.riksarkivet.se/sbl/artikel/11010>.



**Eŭgeno Lanti**  
(1879–1947)

**Lanti**, pseŭd. de **Eugène Aristide Alfred Adam** [eĵen adám]. Franco. Nask. 19 jul 1879. Filo de ĉarpentisto Jean Antéonor Adam (1841-1908) k ties edzino Henriette Céleste Clémentine Laniepece (1848-??), kiuj havis etan farmbienon apud la vilaĝo Néhou (dep. Manche en Normandio). Post elementa lernejo en Néhou estis metilernanto de lignaĵisto en Bricquebe k Valognes (dep. Manche). En 1897 eklaboris kiel meblisto en Rueno. Post laboro en kelkaj urboj en 1903 ekloĝis en Parizo, aliĝis

al vespera kurso pri instruado de meblo-desegnado k en 1907 diplomigis kiel element-lerneja fakinstruisto; en ĉi tiu ofico laboris ĝis sia pensiigo en 1935, kiam la registaro reduktis la buĝeton k ebligis fruan emeritiĝon al instruistoj. Dum la Unua Mondmilito estis ambulancisto. En la junaĝo aliĝis al anarkiismo, kunlaboris en anarkiismaj gazetoj k partoprenis diskutojn, en kiuj ricevis la kromnomon Lanty el la franca *L'anti* = kontraŭulo. Post la Unua Mondmilito aliĝis al komunismo (en decembro 1920 partoprenis la fandan kunvenon de la Franca Komunista Partio, tiam: Franca sekcio de la Komunista Internacio), sed en 1928 forlasis komunismon favore al sia propra sennaciismo.

En 1908 edziĝis kun Marie Pélagie Adèle Corniere, sed post kelkaj monatoj ili ĉesis vivi kune. Oficiale divorcis nur en 1934, por edziĝi kun la brita e-istino Hélène Ellen Kate Limouzin (1870-1950), kun kiu li kunloĝis en Parizo ekde 1926. Seninfana. En 1936 forveturis el Francio, longe vojaĝis (Hispanio, Portugalio, Japanio, Aŭstralio, Novzelando, Urugvajo, Argentino, Ĉilio), en 1940 ekloĝis en Meksiko. Suferante pro tumoro en la kapo, Lanti sin pendumis la 17an de januaro 1947 en Meksikurbo.

Esp: 1914 aŭtodidakte en la armea ambulanco, poste lernis Idon. En sia unua prilingva verko, aperinta en 1919 kun postparolo de R. Rolland, pledis nek por Eo, nek por Ido, sed ĝenerale por la internacia planlingvo. En la refonda kunveno (1920) de la laborista E-asocio *Liberiga Stelo* iĝis redaktoro de ĝia organo *Le Travailleur Espérantiste* (poste: *Laborista Esperantisto*) k aperigis en ĝi sian artikolon *For la neŭtralismon!* kies broŝurforma eldono (1922) enhavis antaŭparolon de H. Barbusse. En aŭgusto 1921 partoprenis en Prago kunvenon (kongreson) de *Liberiga Stelo*, kiu transformiĝis al Sennacieca

Asocio Tutmonda (SAT). Ekde la fondo de SAT li estis ties gvidanto (prezidanto de la gvidorgano, kiu ekde 1929 nomiĝas Plenum-Komitato) ĝis la 13a kongreso de SAT (Stokholmo, 1933). Redaktis kiel E. Lanty la organojn de SAT *Sennacieca Revuo* (1921-1924) k *Sennaciulo* (1926-28). En 1928 ekuzis la pseŭdonimon Eŭgeno Lanti. Somere 1922 okaze de sia vizito al la Komunista Internacio en Moskvo starigis kontaktojn kun E. Drezen k aliaj gvidantoj de SEU k interkonsentis pri kunlaboro de SAT k SEU, danke al kiu la membraro de SAT kreskis, k la 6a Kongreso de SAT okazis en Leningrado (1926). Verkis du studojn *La laborista esperantismo* (1928) k *Manifesto de la sennaciistoj* (1931), kiuj lanĉis sennacismon, kiu vekis kritikon de Sovetuniaj k alilandaj komunistoj, kiuj en aŭgusto 1932 fondis Internacion de Proleta Esperantistaro. Iniciatis la *Plenan Vortaron de Esperanto*, kiun SAT eldonis en 1930 (la 11a eldono aperis en 1996).

Post la rezigno de la gvida rolo en SAT (1933) Lanti daŭre verkis k tradukis; en 1935-36 eldonis sian propran gazeton *Herezulo* por kritiki la realan socialismon en USSR k popularigi sennacismon. Dum sia mondvojaĝo (1936-40) k en Meksiko (1940-47) kunlaboris kun lokaj e-istoj. Lia verko *La laborista esperantismo* aperis france, germane, nederlande k svede; *Manifesto de la sennaciistoj* france k angle. La broŝurservo de SAT en la 1980aj jaroj eldonis lian trivoluman verkaron. En 1976 aperis la libro *Vivo de Lanti* de E. Borsboom, kiu enhavas ankaŭ la nefinitan membiografiecan verkon *Fredo* de Lanti.

▼ *Où en est la question de la Langue Internationale: Solution pratique* (1919); *For la neŭtralismon!* (1922); *La Langue Internationale: Ce que tout militant ouvrier doit connaître de la question* (1925); *La laborista esperantismo* (1928; germane

1928, svede 1931, nederlande 1932, france 1934); Voltaire. *Kandid* (Tr., 1929); *Naciismo* (1930); *Manifesto de la sennaciistoj* (1931; france 1931, angle 1937); *Vortoj de kamarado E. Lanti* (1931); *Absolutismo* (1934); *Herezaĵo* (1934); Gille P. *Skizo pri filozofio de la homa digno* (Tr., 1934); *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?* (Kun R. Guihéneuf, 1935; hispane 1936); *Leteroj de E. Lanti* (1940); Voltaire. *Tri verkoj de Volter* (Tr., 1956); *Pri sennaciismo* (1961); *Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat* (1973); Ryner H. *Por nia medito* (Tr., 1978); Ryner H. *La veraĵ interparoladoj de Sokrato* (Tr., 1979); Lanti E. *El verkoj de E. Lanti* (Vol. 1 1982, Vol. 2 1983, Vol. 3 1985); Ledantec F. *La konflikto* (Tr., 1987).

**B** CEOLE, p. 102-104; EdE, p. 325; HEL, p. 179-180; OVP, p. 9-10. Borsboom E. *Kie miozotas memor’*. Hago, 2017, p. 81-84; Borsboom E. *Vivo de Lanti*. Parizo, 1976; Duc Goninaz M. *La socia statuso de Esperanto: tri historiaj teorioj (Zamenhof, Lanti, Lapenna) konfronte al la nuna realo (Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo*. Varsovio, 1985, p. 34-41); *Historio de SAT. 1921–1952*. Parizo, 1953; Korĵenkov A. *Historio de Esperanto*. Kaliningrado, 2005, p. 80-88; Lins U. *La danĝera lingvo: Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen, 1988; Markov A.-S. *Le mouvement international des travailleurs espérantistes 1918–1939*. Versailles, 1999; Silber G. *De 1901 al 2001: La homaranismo de Zamenhof, la sennaciismo de Lanti, la spirita sinkretismo de Privat, la raŭmismo de la Esperanta Civito (Homarane, 2010, №1)*; Waringhien G. *Beletro, sed ne el katedro*. 2a eld. Antverpeno, 1987, p. 101-105. Bartelmes N. *Vojaĝo tra la penso-mondo de E. Lanti (Sennacieca Revuo, 1970, №98)*; Bartelmes N. *Eŭgeno Lanti, la homo kaj la pensulo (Sennacieca*

*Revuo, 1972, №100)*; Lagrange G. *Lanti post du generacioj (Sennacieca Revuo, 1976, №104)*; Lins U. *Drezon, Lanti kaj La Nova Epoko. La proksimiĝo de la sovetia Esperanto-movado al SAT (Sennacieca Revuo, 1987, №115)*; Lagrange G. *Privat kaj Lanti (LOdE, 1992, №2, 3)*; Lins U. *Disigitaj amikoj: La lasta korespondo inter Demidjuk, Nekrasov kaj Lanti (LOdE, 1996, №3, 4–5)*; Korĵenkov A. *Eŭgeno Lanti, la unua sennaciisto (LOdE, 2015, №8-9)*; Amouroux J. *Ĉiu medalo havas reverson; La mortiga malsano de Lanti (LKK, 2017, №161)*. <http://esperanto-contentin.fr/articles.php?lng=fr&pg=68>.



**Ivo Lapenna**  
(1909–1987)

**Lapenna, Ivo.** Kroato. Nask. 5 nov 1909 en Split (tiam en Aŭstrio-Hungario, nun en Kroatio) en dalmata aristokrata familio de la kroatlingva konstruĝiniero k universitata profesoro Petar Lapenna (1867-1940) k la itallingva pianistino Amelia Lapenna (1883-1957). Post gimnaziaj studoj en Split k Zagrebo studis en la Zagreba Universitato, kie diplomiĝis pri juro (1932) k doktoriĝis (1933). Krome diplomiĝis kiel muzikinstruisto (1933), k post arma servo (1933-34) iĝis rezerva leŭtenanto. Laboris en kortumoj k advokatejoj de Zagrebo. En 1941 revenis al Split, aliĝis al la kontraŭfaŝista rezistado k plenumis diversajn taskojn, precipe ĵurnalistajn, i.a., kiel redaktoro de la gazeto *Slobodna Dalmacija* (Libera Dalmatio). En 1945 eksarmeaniĝis en la rango de

majoro; laboris kiel departementestro pri presaferoj de Kroatio, poste kiel redaktoro de la oficiala gazeto de Kroatio *Narodne Novine*. Instruis juron k diplomation en la Zagreba Universitato, estis membro de la jugoslavia delegacio en la packonferenco en Parizo (1946), advokato-konsilisto de Albanio en la proceso kontraŭ Britio antaŭ la Internacia Kortumo en Hago (1947-48).

En la fino de 1949 I. Lapenna forlasis Jugoslavion k ekloĝis en Parizo, laborante ĉe Nacia Centro por Sciencaj Esploroj. En 1951 migris al Londono, kie laboris kiel lekciisto, docento k profesoro pri kompara soveta k orienteŭropa juro en la Londona Lernejo de Ekonomiaj k Politikaj Sciencoj ĉe la Universitato de Londono ĝis sia emeritiĝo (1977); daŭrigis labori kiel emerita profesoro ĝis oktobro 1987. Membro de pluraj sciencaj institucioj, gastprofesoro en pluraj diverslandaj universitatoj (i.a. en Harvard, Usono). Brita ŝtatano ekde 1962. Verkis ĉ. 150 fakajn studojn en ses lingvoj. Libroforme aperis kvin liaj libroj: *Unuiĝintaj Nacioj* (kroate, 1946), *Historio de Diplomatio* (2 vol., kroate, 1949), *Sovetiaj konceptoj de internacia publika juro* (france, 1954), *Ŝtato kaj juro: Sovetia kaj Jugoslavia teorioj* (angle, 1964), *Sovetia punjura politiko* (angle, 1968). Sciis plurajn lingvojn, bone ludis violonĉelon, en la junaĝo multe sportis k havis rekordojn de Jugoslavio por kurado je 400 k 800 metroj.

Trifoje edziĝis: en 1934 kun jugoslavino Emilija Heiligstein (1910-84), en 1944 kun rusino Ljuba Knjaĵinskaja (1909-85), en 1987 kun danino Birthe Zacho (1935) kun kiu li havis proksimajn rilatojn ekde 1956. Filo (de B. Zacho): Ivo Pierre Zacho (1965). Liaj edzinoj estis aktivaj e-istinoj. Forpasis 15 dec 1987 en Kopenhago, estas entombigita en Rødovre Kirkegaard.

Esp: 1928 aŭtodidakte. En 1929 kunfondis Studentan E-Klubon (poste

Akademia E-Klubo) en la Zagreba Universitato k prezidis ĝin ĝis 1941; en la 21a UK (Budapeŝto, 1929) kunfondis la Studentan Tutmondan E-Ligon STELO k prezidis ĝin ĝis la Dua Mondmilito. Prezidanto de Jugoslavia E-Ligo (1937-50). Gvidis entute 77 E-kursojn en Jugoslavio (1929-49), por kiuj verkis lernolibron (3 eldonoj: 1938, 1939, 1946). En siaj paroladoj k en *La Suda Stelo* kontraŭis la absolutan neŭtralecon de E-asocioj al la kreskanta faŝismo. En la 30a UK (Londono, 1938) faris kontraŭfaŝisman paroladon k estis elektita kiel komitatano de IEL. En la 32a UK (Berno, 1947, la unua postmilito), okazinta post la reunuiĝo de IEL k UEA, proponis kontraŭfaŝisman porsovetian rezolucion, kiu estis malakceptita. Sian movadan celon formulis jene: “Kontraŭbatali kian ajn misuzon de UEA por partipolitikaj celoj kaj samtempe defendi la principon de aktiva neŭtraleco de UEA”. Per apliko de tiu aktiva neŭtraleco, atingis, ke en 1952 UEA k SAT sendis nefermitan leteron al Stalin kun kritiko de la soveta lingva imperiismo k kontraŭesperanta politiko. Komence de la 1950aj jaroj gvidis kampanjon por agnoskigo de Eo ĉe Unesko k atingis, ke 10 dec 1954 Unesko pozitive rezoluciis pri Eo, k akiris por UEA konsultajn rilatojn kun Unesko.

Meze de la 1950aj jaroj iĝis por du jardekoj la ĉefa figuro en UEA. Ĝenerala sekretario (1955-64) k prezidanto (1964-74) de UEA. Kompilis tri bazajn laborprogramojn de UEA (1955, 1962, 1973). Iniciatis ISU (nun IKU) en 1949 k mem prelegis en ĝi, ellaboris novan statuton de UEA (1955) k la Fundamentan Principaron de Informado pri la Internacia Lingvo (Principaro de Frostavallen, 1956). Starigis la libroserion *Oriente-Okcidento* (1961). En 1952 fondis CED k estis ĝia honorofica direktoro ĝis 1975; eldonis ĉe CED dekojn

da broŝuroj, artikoloj k informfolioj, kiujn li mem verkis aŭ kompilis en Eo k aliaj lingvoj. Lia artikolo *Sepdek jaroj de la Internacia Lingvo* (1957) aperis en 94 gazetoj en 12 lingvoj. Kunordigis la agadojn de la Zamenhof-Jaro (1959) k kompilis memorlibron pri ĝi (1960).

Pro sia aktiva pozicio I. Lapenna en 1955-56 estis atakita de ekstreme dekstraj usonaj e-istoj k iliaj eŭropaj samideanoj. En la komenco de la 1970aj jaroj li estis atakata de orient-eŭropaj E-gvidantoj, aktivuloj de TEJO k okcidentaj malkontentuloj pri lia laborstilo. En la 59a UK (Hamburgo, 1974) la opozicio ekdominis la Komitaton de UEA, pro tio I. Lapenna ne rekandidatiĝis por la prezidanteco k forlasis siajn funkciojn en UEA, inkluzive de la honora membreco en UEA k TEJO. En *Hamburgo en retrospektivo* (1975, 2a eld. 1977) k en aliaj verkoj prezentis sian demision kiel sekvon de “komunista puĉo” en UEA. Nur pli ol sep jarojn post la forpaso de Lapenna, prezidanto de UEA J. Wells en sia festparolado en la 80a UK (Tampere, 1995) en la nomo de UEA esprimis bedaŭron pro atakoj k kalumnioj kontraŭ Lapenna faritaj lige kun la eventoj de 1974.

I. Lapenna daŭrigis sian E-agadon en ICNEM k ties gazeto *Horizonto*, fondita en 1976; kunfondinto de ICNEM k ties sola prezidanto (1980-87). Dum la agado en ICNEM aldonis al la koncepto *aktiva neŭtraleco* la koncepton *humaneca internaciismo*: tuthomara internaciismo senigita de klasa, religia aŭ alispeca grupa karaktero, k ligita kun la valoroj de la Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948) k kun Eo, kiel lingvo ne ligita al iu ajn nacio, religio aŭ klaso. En 1957 fondis k prezidis ĝis sia morto Internacian E-Asocion de Juristoj k redaktis ĝian organon *Internacia Jura Revuo* (1976-80). Membro de AdE (1952-87). Plenrajta membro de AIS

ekde ties fondo (1983-87). Lia lasta realigita projekto estis okazigo de Internacia Jubilea E-Konferenco (Graz, julio 1987) kun la temo “100 Jaroj de Esperanto-Kulturo”, en kiu okazis altnivela prelegaro k inaŭguro de la monumento “La Espero”.

Verkis pli ol 1500 artikolojn, noticojn, recenzojn, dokumentojn k aliajn tekstojn en/pri Eo, inter kiuj elstaras *Retoriko*, trifoje eldonita en Eo (1950, 1958, 1971) k tradukita al la japana k rusa lingvoj. Ĉefaŭtoro k redaktoro de la ampleksa (876 p.) enciklopedieca studo *Esperanto en perspektivo* (1974), kiun kunredaktis T. Carlevaro k U. Lins. Unu el la plej bonaj E-oratoroj, faris ĉefparoladojn en UKoj, poste en la internaciaj konferencoj de NEM; pluraj liaj paroladoj aperis en diskaj k kasedoj k en 2003 estis reeldonitaj en kvin K-Diskoj.

Okaze de lia 75a naskiĝdatreveno en 1984 estis starigita Fondaĵo Ivo Lapenna. Ĝi disponigis en sia retejo la ĉefajn verkojn de Lapenna, starigis stipendion Lapenna por subvencii universitatajn disertaciojn pri esperantologiaj temoj k Internacian Sciencan Instituton Ivo Lapenna por science pritrakti k disvastigi liajn ideojn, precipe la koncepton de la humaneca internaciismo. En 2001 sub la aŭspicio de ĉi tiu instituto aperis pli ol 400-paĝa kolekto *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. En 2014 aperis *Esploro kaj dokumentado*, kolekto de liaj verkoj, aperintaj en *Horizonto*, kolektitaj k editoritaj de B. Lapenna; la pdf-versio estas senpage elŝutebla en la retejo de la Fondaĵo Ivo Lapenna. Okaze de lia centjariĝo aperis poŝtmarko pri I. Lapenna (Nederlando, 2009).

▼ *Meĉunarodni jezik u historiji i danas* (1935); *Esperanto u deset lekcija* (1938); *Engleski ili Esperanto* (1940); *Retoriko. Kun aparta konsidero al Esperanta parolarto* (1950; japane 1977, ruse 2000); *Aktualaj problemoj de*

*la nuntempa internacia vivo* (1952); *La internacia lingvo: Faktoj pri Esperanto* (1954); *Seventy years of the International language* (angle, fr., germ., pole 1957, port. 1959); *La lingva problemo en la internaciaj rilatoj* (1962, ankaŭ en aliaj lingvoj); *Bazaj faktoj pri la internacia lingvo (Esperanto)* (1965, ankaŭ en aliaj lingvoj); *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* (1966); *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj statuto de la Internacia Kortumo* (Tr. kun R. Harry k E. Svane, 1970); *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo* (Kun U. Lins k T. Carlevaro, 1974); *Por pli efika informado* (1974); *Hamburgo en retrospektivo* (1975); *Juraj terminologiaj problemoj* (1987); *Kritikaj studoj defende de Esperanto* (1987); *Esploro kaj dokumentado* (2014).

**M** *Paroladoj de Ivo Lapenna* (5 KDoj, 2003).

**B** AIS, p. 255-256; BLKE, p. 85-88; CEOLE, p. 231-234; HEL, p. 351-355; LAJE, p. 123-124; OVP, p. 136-139. *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. Kopenhago, 2001; Dijk Z. van. *Historio de UEA*. Partizánske, 2012, p. 239-289; Dijk Z. van. *La Asocio: Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA*. Antverpeno, 2008, p. 277-287; Lapenna B. *Elektitaj konceptoj de d-ro Ivo Lapenna*. San Marino, 1993; Lins U. *Utila Estas Aliĝo: Tra la unua jarcento de UEA*. Rotterdam, 2008, p. 75-112; *Memore al prof. d-ro Ivo Lapenna*. Kopenhago, 1988; *Memorlibro pri la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo: Graz 1987*. Rødovre, 1989. V. R. *Ivo Lapenna – Heroo de Montevideo* (Eo, 1955, №3); Lapenna I. *Bibliografiaj notoj (Horizonto, 1984, №6)*; Eo, 1988, №2 (Nekrologa numero); Wells J. *Kvardek jaroj en retrospektivo* (Eo, 1995, №9); Korĵenkov A. *Ivo Lapenna: Triumfo kaj fiasko* (LOdE, 1997, №7); Lapenna B. *Neniam Lapenna*

*havis fiaskojn* (LOdE, 1998, №3); Künzli A. *Inter “aktiva neŭtraleco” kaj “humanece internaciismo”* (LG, 2009, №143); Minnaja C. *Miaj kontaktoj kun Ivo Lapenna* (LF, 2009, №242, 243); *Esperanto en Danio*, septembro 2009 (Speciala numero pri I. Lapenna); Pleadin J. *La jaro de Lapenna* (Eo, 2009, №11); Tonkin H. *“Generale parolante” – Lapenna kiel gvidanto kaj oponanto* (BA, 2010, №8); Ĉolić S. *Lingvo kaj mito* (Zagreba E-isto, 2014, №3-4); Lins U. *La du flankoj de Ivo Lapenna* (BA, 2014, №19); Korĵenkov A. *Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA* (LOdE, 2015, №12); Tonkin H. *CED, Unesko, kaj la “posthamburga” UEA: Rakonto el la pasinteco* (LOdE, 2017, №1). Fondaĵo Ivo Lapenna <http://www.ivolapenna.org/index.htm>.



**Jean-Marc  
Leclercq  
(1961–)**

**Leclercq, Jean-Marc** [ĵan-mark leklér]; pseŭd.: JoMo, jOmO. Okcitano. Nask. 10 okt 1961 en Lillo kiel la dua infano en duinfana familio. Patro: Pierre Leclercq (1936-2015), teknika desegnisto; patrino: Nicole Traverso (1936), poŝtistino. En 1962 kun la familio ekloĝis en Tuluzo. Post lernejoj studoj en Tuluzo dum du jaroj studis en la literatura universitato Le Mirail (Tuluzo) k bakalaŭriĝis. En la 1980aj jaroj vivtenis sin per diversaj laboroj, i.a. kiel librotenisto en aŭkcio en Tuluzo; en libera tempo muzikis k kantisto en *Les Diam's*, *Les Gringos*, *Les Évadés d'Alcatraz*, *Les Queen Bees* k. a.